# B U L T E N O


DE LABORISTA LIGO ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO

VĚSTNÍK SVAZU DĚLNICKÝCH ESPERANTISTU V Č. S. R.

Plzeň Julio 1938

I. Tutlanda kongreso
de laboristaj esperantistoj en Č. S. R.
6. kaj 7. de aŭgusto 1938 en Plzeň en
Laborista domo de DTJ. Plzeň II.

I. Celostátní sjezd
dělnický esperantistů v Československu 6. a 7. srpna 1938
ve Spolkovém domě D. T. J. Plzeň II.



VI. Laborista
Ekonomia kaj Industria Ekspozicio

1938 en Plzeň.

## I. Tutlanda kongreso de laboristaj esperantistoj en Plzeň.

Laborista ligo esperantista sincero invitas ĉiujn esperantistoj al I. Tutlanda kongreso de laboristaj esperantistoj, kiu okazos la 6. kaj 7. de aŭgusto 1938 en Plzeň.
La kongreso estos aranĝota en la kadro de la VI. Jubilea laborista industria kaj ekonomia ekspozicio, kiun partoprena ankaŭ la laboristaj esperantistoj, per sia propra ekspozicio.
La programo de la kongreso estas:
Sabato la 6an de aŭgusto je la 8. horo vespere en Laborista domo de D.T.J. Plzeň II.

AMIKA INTERKONATIĜA VESPERETO
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Kun programo: Malfermo
Recitado
Kanto
Muziko

Dimanĉe la 7an de aŭgusto je la 9. horo matene en la sama ejo okazos

TUTLANDA KONGESO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ
xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Kun programo: 1./ Malfermo de la kongreso
2./ Salutparoloj de delegitoj kaj gastoj
3./ Esperanta movado en Č.S.R.
4./ Unuiĝo de laboristaj esperantistoj
5./ Diversaĵoj.

Post la kunveno okazos komuna vizito de esperanta ekspozicio kaj posttagmeze de la tuta ekspozicio.
Ni esperas, ke ĉiu laborista esperantisto propagandos la kongreson kaj laŭ ebleco partoprenos ĝin persone.
Ĉiujn informojn pri la kongreso kaj ekspozicio oni povas ricevi ĉe la laborista ligo esperantista Plzeň-Peklo, tien ankaŭ sendu aliĝilojn.

## Kongresaj informoj.

\+ Al tiu ĉi kongresa numero ni aldonis aliĝilon por la I. Tutlanda kongreso kaj ni petas vin, ke vi ple baldaŭ sendu sian aliĝilon al la liga adreso.
\+ Kongreskotizo estas Kč 5.-- por ĉiu partoprenanto.
\+ Partoprenantoj de la kongreso kaj ekspozicio ricevos 50% rabaton de fervojo je ekspozicia legitimacio kiu kostas inkluzive enirbileto por la ekspozicio Kč 8.--. Ekspozician legitimacion vi ricevos ĉe Kancelář VI. jubilejní výstavy Plzeň, aŭ vi povas mendi ĝin pere de sekretatio de la ligo.
\+ Laŭ ebleco ni prizorgos privatajn loĝejojn, aŭ komunan loĝojon en lernejo kaj se iu deziros, do ankaŭ en hotelo. Sed estas dezirinde, ke vi la aliĝilojn sendu plej frue, por ke ni povu ĉion bone prizorgi por via kontento.
\+ Okaze se vi ne havas ligan poŝtĉekon por pagi kotizon kaj legitimacion, uzu la blankan poŝtĉekon, kiun vi ricevos en ĉiu poŝtofico kaj enskribu numeron 87.136 Praha, Laborista ligo esp. Plzeň-Peklo.
\- Se inter vi estas gekamaradoj kiuj intencus viziti kongreson, aciigu al ni iiajn adresojn kaj ni sendos al ili aliĝilojn.

## K I. Celostátnímu sjezdu dělnických esperantistů v Plzni

Před padesáti lety předán byl světové veřejnosti mezinárodní pomocný jazyk Esperanto. Jeho tvůrcem dr. L.L.Zamenhofem bylo jedinou touhou přinésti lidstvu celého světa neutrální dorozumívací prostředek, když všechny ostatní pokusy používání k jednotnému dorozumění některé z živých řečí ztroskotaly. Sledujíce rozšíření řeči Esperanta v období 50 let mnozí kriticky odmítají možnost uvedení Esperanta jako jediného mezinárodního dorozumívacího prostředku. A přece objektivnímu pozorovateli nemůže ujíti, že Esperanto již hluboko zapustilo své kořeny. V každé zemi ekzistují informační esperantské kanceláře, četné esperantské svazy, vydávány nejrůznější časopisy, bohaté knihovny a překlady děl ze všech možných jazyků, které často nemohou být přeložen do řeči národní jsou toho dokladem. Každým rokem koná se řada mezinárodních esperantských kongresů a je radost býti účastníkem takového kongresu, kde shromáždí se sta a sta delegátů z nejrůznějších zemí všech světadílů. Všichni mluví jen jedním společným jazykem Esperantem. Není žádných obtíží tlumočnických, ani nedorozumění z překladů jež jsou tak obvyklé při všech mezinárodních konferencí kde není používáno Esperanta i při nákladném tlumočnickém aparátu.

Je sice pravda, že Esperanto nedoznává takového rozšíření jakého svým významem by zasluhovalo. Ale není to vinou jeho, nebo že by snad bylo nedokonalým jazykem, nebo jeho propagátorů, nýbrž proto, že Esperanto jako nejdůležitější prostředek k dorozumění a sbratření lidstva nemá ještě té přízně a podpory se strany mocných, kteří dorozumění lidstva si nepřejí a sbratření teprve ne. A právě dělnictvu celého světadílů nejvíce musí záležeti na tom, která z idejí má raziti si cestu k lepšímu vývoji a uspořádání světa. Zda je to idea Esperantem k dorozumění a socialismu, anebo fašismem k šovinismu a rasismu. Neboť dělnictvo právě na svých bedrech nejvíce cítí, bez rozdílu jazyka, která z těchto idejí přichází k uplatnění.

Před padesáti lety dal jediný muž světu prostředek jímž mělo se lidstvo dorozuměti a tak učiti se vzájemné lásce mezi národy. Dnes když díváme se na výsledky padesátileté činnosti této geniální myšlenky, jsme sice velmi spokojeni co bylo dosaženo za tuto dobu, ale nemůžeme se ubrániti mocnému dojmu když vidíme, že i dnes uchází se o přízeň lidstva celého světa několik mužů, kteří poměrně v krátké době docílili pozoruhodných výsledků své činnosti, bohužel zračících se v rozbořených městech roztrhaných těl dětí, žen a starců ve Španělsku, Číně, Habeši i jinde.

Esperanto v zemích ovládaných těmito muži nemá možnosti k rozvoji aneb jest vůbec zakázáno, neboť jest pokládáno za revoluční element. V demokratických státech jest svoboda, a voláme proto i u nás dělníky by učili se mezinárodnímu jazyku a tím přispívali k zlepšení poměrů svých, celku i světa.

Svaz dělnických esperantistů se sídlem v Plzni, odhodlává se poprvé ku svolání celostátního sjezdu dělnických esperantistů na dny 6. a 7. srpna 1938 do Plzně, v rámci VI. Dělnicko-živnostenské a hospodářské výstavy. Na sjezdu projednána bude řada důležitých otázek týkajících se života a práce dělnického esperantského hnutí v republice. Sjezd koná se v místnostech spolkového domu Dělnické tělocvičné jednoty Plzeň II. a bude mu předcházeti v sobotu 6. srpna o 8. hodině večerní přátelský seznamovací večer s esperantsko-českým a zábavním programem. Zveme všechny příznivce a zájemce Esperanta na tento večírek.

Kalný Franta

## Nia kongresejo.

La I. Tutlanda kongreso de laboristaj esperntistoj okazos en Laborista domo de D.T.J. /Laborista gimnastikunuiĝo/ Plzeň II. Ĝi troviĝas en suda parto de la urbo nomata "Pražské předměstí", dek minutoj malproksime de ĉefstacidomo en Jablonská strato. Estas tie kinejo, kelkaj haloj, restoracio kie oni povas tagmanĝi ktp. Sed tagmanĝon oni devas mendi tuj matene!

## La Jubilea ekspozicio 1938 en Plzeň

La 25. de junio estis malfermita la VI. Laboristo-ekonomia kaj industria ekspozicio la fundamento kaj vasteco de la ekspozicio surprizis ne nur ekster-plzeň-anojn, sed eĉ plzeň-anoj mem. Ekspozicio estas plejparte regiona sed disdividita je kvar komercaj sektoroj: Plzeň-a, Budějovice-a, Cheb-a kaj Praha-a. Do ĝi estas intermiksita ekspozicio, laŭ la ofica titolo kaj ne nur loka. Ekspozicias tie ankaŭ ministerioj de fervojoj, de poŝto, socialaj zorgoj, korpkulturo, saneco kaj ŝtataj tabakentreprenoj. Do havas la ekspozicio regionan, ŝtatan, kulturan kaj ekonomian signifon. Sur la ĉefekspozicia placo estas 28 pavilonoj sur ambaŭ bortoj de rivero Mže sub belega parko "Lochotín". Krom tio estas ekspoziciaĵoj lokitaj en kvin lernejoj, en ambaŭ haloj de Laborista domo kaj ĝardenaj konstruaĵoj. Ĉefekspoziciejo kun monumenta pordego tre impresas. Amuza parto estas sur maldekstra bordo de la rivero kaj dominas en ĝi grandega pavilono de bierfarejo "Prazdroj" por 2.000 personoj. En la parka loko de amuza parto povas esti 20.000 personoj. Oni aranĝas tie koncertojn, amuzvesperojn kaj aliajn amuzaranĝojn.

## H u m o r o .

### La kliento ĉiam estas prava.

Karlo estis vendisto en granda magazeno. La devizo de lia ĉefo estis: la kliento ĉiam pravas. Kaj kiam kliento plendis pri servisto, la servisto estis punata sen pluo. Tio ankaŭ kelkfoje okazis al Karlo. Kaj kiam la trian fojon kliento plendis pri li, la ĉefo maldungis lin, tute malatentante la protestojn de Karlo, kiu diris ke la kliento estas malprava, kaj ke li mem pli prave povus plendi pri la sinteno de la kliento kontraŭ li. Sed . . . la kliento ĉiam estas prava, kaj Karlo devis serĉi alian laboron. Post longa tempo li fine fariĝis policisto. Foje li renkontis unu el siaj antaŭaj kolegoj kiu demandis, ĉu la nova laboro plaĉas al li.
- Ho jes, - diris Karlo. - La salajro estas bona, la labortempo ne tro longa. Kaj kio pleje plaĉas al ni: la kliento nenian estas prava. Eĉ kiam ni batas iun senmotive kaj li poste plendas pri tio, ni estas pravaj kaj ne la kliento.

### La ruzaj skotoj

Du aŭtomobiloj koliziis. Ambaŭ veturiloj estis ege difektitaj, sed aŭtomobilistoj feliĉe ne vunditaj. Unu el ili, skoto, prenis botelon da skota viskio el sia poŝo. - Trinku ion da viskio kontraŭ la ektimo. - li diris, proponante la botelon al la alia. Tiu trinkis kelkajn glutojn kaj volis redoni la botelon.
- Ne, ne – diris la skoto, trinku ankoraŭ ion. Denove la alia trinkis. Sed vi mem ja tute ne trinkas. - Ne respondis skoto, mi atendas ĝis post la polica esploro pri la kulpo je la akcidento.

- - - - - - - - o O o - - - - - - - -